

Renkontiĝo en Mont-Soleil kaj Jacques Mühlethaler
Claude Gacond, 112-a radioprelego, 1965.11.24 & 1965.11.27

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond.

Se du idealoj samcelas, tiam ili necese renkontiĝas. Pasintan jaron en la kadro de la Svisa Nacia Ekspozicio okazis en Lausanne **Tago de la Paco**, kiu grupigis anojn el plej diversaj movadoj. Cento da esperantistoj partoprenis tiun manifestacion kaj mi havis la honoron paroli en ilia nomo.

Mi prezentis la progresojn de nia lingvo, menciis ĝian pozitivan influon favore al la malaperigo de la lingvaj muroj interpopolaj kaj indikis, ke la instruado de nia lingvo estas vojo al monda civitaneco. La konkludajn vortojn mi rediris en esperanto : « *La instruado de esperanto komprenigas al la infanoj, ke sur la Tero ne plu estas francoj kun angloj, rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.* »

Alia parolanto diris preskaŭ la samon. Li nomiĝas Jacques Mühlethaler kaj pilgrimas tra la mondo por proklami la supernacian kaj homaranan funkcion de la lernejoj. Li diris : « *Unu rimedo por konstrui la pacon estas kondiĉi la infanon per konvena eduko sufiĉe malfermata kaj kapabla naski lin al nova dimensio, kie oni pensas **monde**.* » Li emfazis : « *La lernejo estas je la servo de la homaro, antaŭ ol esti je tiu de nacio aŭ de ajna anaro.* » Li legis Universalan Konvencion, kiun li proponadas al la registaroj por akceptigo. Vi rimarkos, ke ĝi esprimas aspekton de nia homaranismo. Aŭskultu :

« **Ĉarto de la homoj.**

1. *La lernejo estas je la servo de la homaro.*
2. *Unu el la ĉefaj roloj de la lernejo estas malfermi al ĉiuj infanoj en la mondo la vojon al reciproka kompreno.*
3. *La lernejo instruas la respekton al la vivo kaj al la homoj.*
4. *Toleremo naskiĝas kaj ekfloras, kiam ni akceptas ĉe la aliaj sentojn, pens- kaj ag-sintenojn, kiuj diferencas de tiuj, kiujn ni kredas veraj. Toleremo plilarĝigas la penson, invitas al dialogo, alproksimigas la homojn.*
5. *Konscienco pri respondeco akcelas renkonton al la proksimulo, unu el la plej grandaj privilegioj de la Homo. Ju pli lia kondiĉo pliboniĝas, des pli li devas konsciigi pri siaj respondecoj.*
6. *Per individua kaj ĉiutaga streĉo la homa komunumo progresas kaj la homo venkas sian egoismon.*
7. *Kompreni kaj respekti, ami kaj servi, jen la spirito de tiu ĉarto.* »

Tiu ĉarto havas aldonajn, kiu bone diras la nunan laboron kaj sintenon de Jacques Mühlethaler :

« *Ege urĝas vidi ĉiujn registarojn en la mondo akcepti meti la lernejon je la servo de la homoj, de la universala konkordo kaj de la viv-evoluo. Tiom longe, kiam tiu decido atendiĝos, paco restos nur mito, utopio aŭ tre ofte skandala konfid-ekspluato.*

Por ke la lernejo kapablu efike plenumi sian noblecan kaj bravan homecan mision, tio estas samtempe esti la levilo de la homaro kaj la ŝildo de la homo, tiu ĉarto devus esti instruata al ĉiuj infanoj en la mondo, geknaboj kaj plenkreskuloj, kiuj lernas legi ; ĝi devus troviĝi en la komenco de la libroj pri civitana instruado kaj historio. »

Vi certe bone sentis la najbarecon inter nia idealo kaj la laboro de Jacques Mühlethaler. La publiko ankaŭ rimarkis ĝin. Ankaŭ ni ambaŭ. Pro tio ni renkontiĝis kaj diskutis nian mondkoncepton. Konsekvenco : Jacques Mühlethaler komencas lerni nian lingvon kaj Esperanto-Edukistaro de Svislando invitis lin al sia jarkunveno 1965-a. Estis tre bela renkontiĝo, kiu okazis komence de septembro en montara lernejo, kie esperanto estas oficiale instruata de du jaroj. La gelernantoj de Mont-Soleil [Monto de la Suno] malfermis

Renkontiĝo en Mont-Soleil kaj Jacques Mühlethaler
Claude Gacond, 112-a radioprelego, 1965.11.24 & 1965.11.27

la sabatan vesperon kantante nian Himnon kaj recitante tiun Ĉarton. La gepatroj kaj lernejaŭtoritatoj fieris pri iliaj kapabloj kaj kun grandega intereso aŭskultis Jacques Mühlethaler rakonti sian pilgrimadon tra la mondo, en Usono, Aŭstrio, Sovetio, Popola Ĉinio, Japanio kaj multaj aliaj landoj por renkonti edukministrojn kaj ŝtatestrojn kaj al ili prezenti tiun Ĉarton. Ni malkovris ĉe tiu ĝenevano la hardon, kiu antaŭ unu jarcento devis movi Henri Dunant, alia ĝenevano, kiu tedis la ŝtatestrojn, ĝis kiam ili akceptis lian proponitan Ĉarton.

Dum la venontaj elsendoj mi prezentos al vi la personecon kaj pilgrimadon de Jacques Mühlethaler. Se vi deziras ricevi la tekston de tiu Ĉarto, petu ĝin al Svisa Kurtonda Radiostacio en Berno.

Nome de Svisa Kurtonda Radiostacio Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-